



# ESPERO KATOLIKA

## KARAJ LEGANTOJ

Post la sciigo, ke ek de januaro 1961 ĉiudumonate aperos, aldone al *ESPERO KATOLIKA*, parto el la Nova Testamento, tiel ke niaj legantoj ricevos ĉiujare 48 paĝojn kaj do iom post iom la tutan Sanktan Skribon, envenis aplaŭdoj el diversaj landoj kaj ankaŭ multaj membroj jam pagis sian kotizon por 1961 kun la libervola aldono de unu ned. guldeno aŭ egalvaloro, por ebligi tiun projekton. Tiu sinteno ne nur tre ĝojigis nin pro la financa subteno, sed ankaŭ ĉar el tio montriĝas la komprenemo de nia legantaro. Mi esperas, ke ĉiuj pagos tiun etan aldonon.

La proponoj de du el niaj membroj — p. 188 — ankaŭ havis eĥon, kvankam nur tre malfortan, sed ni esperas ke multaj volos helpi por sendi nian revuon letere, aŭ eĉ presaje, al adreso kiun ni laŭ deziro sendos. Amasa alsendo evidente ne plu estas ebla, sed mi spertis, ke individue senditaj ekzempleroj, ŝalditaj kaj gluitaj en neŭtrala volvaĵo, plej ofte atingas la adresitojn. Sed se mi mem sendas al ĉiuj, tro multaj venas samtempe kaj el la sama urbo; tial estas dezirinde ke multaj helpas min, por ke E. K. atingu niajn geamikojn el multaj landoj kaj je diversaj datoj. Kelkaj legantoj pagis duan kotizon anstataŭ perdita membro, laŭ la dua propono. Ili rezonas, ke en ĉi tiu tempo de altkonjunkturo en diversaj landoj, tia ekstra pago por multaj personoj estas nur bagatelo, kaj tial ili esperas ke la afero havos grandan sukceson. Personoj kiuj kutimas pagi por korespondanto en nepagipova lando, ŝarus al ni kaj al sia amiko grandan plezuron, se ili venigas E.K. al si por mem sendi ĝin al la korespondanto, kiu en tiu kazo havos la plej grandan ŝancon, regule ricevi ĝin, nome aŭ en letero, aŭ en la supre menciita maniero, kiu ne tuj montras la „katolikecon” de la sendaĵo!

Plue 4 membroj sendis la 20-oblan kotizon por *Dumviva Membreco*: ni tre dankas ilin pro la efektiva helpo al nia afero! Ili agas tute kontraŭe al multaj, kiuj mem mendis kaj regule ricevis nian revuon, sed ĉiam bezonas plurajn admonojn antaŭ ol pagi; pluraj eĉ ne pagas en 1-2 jaroj kaj tiam simple resendas E.K. kun rimarko ke ili ne plu deziras ĝin, aŭ atendas tiel longe ke post lasta admono ĉesos la alsendo, kaj neniam pagas la ŝuldon! Tiuj personoj estas parazitoj, kiuj ŝaras grandan domaĝon al nia movado.

Evidentiĝas, ke multaj ne komprenas, ke oni mem devas esprimi la deziron, esti menciita kiel konsulo en la jarlibro: ofte atingas min plendoj, ke oni ja pagas regule, estas ŝidela membro, kaj tamen ne ŝifuras kiel konsulo kiel al ili konataj personoj. Komprenu, ke ne ĉiuj deziras esti menciataj, kaj tial estas nepre necese, skribi poŝtkarton kun nomo, adreso kaj eventuale metio aŭ ŝako, se vi volas esti konsulo. Por ekspliko vidu p. 23 de la Jarlibro 1960.

Mi ŝaros mian eblon, aperigi la Jarlibron 1961 jam en februaro; adresoj de konsuloj, grupoj ktp. devas atingi min antaŭ la 4-a de januaro 1961.

Truus Durenkamp.

# KRISTNASKO

*en la jaro . . . . .*

Kion novan ankoraŭ diri? Multe oni jam prikantis ĝin; multe da rakontetoj nin ĝojigis aŭ emociis...

Sed, jes ... Ĉu vi scias aŭ ĉu vi memoras, kio okazis dum kelkaj Kristnaskaj Festoj.

105. En la jaro 105 Lia Papa Moŝto Aleksandro la Unua, alvenis en la katakombojn de Lucina (laŭdire diino de naskiĝo). Ekstere regadis timiga, nokta silento, ĉar la Imperiestro Trajano, kvankam bona organizanto kaj konstruisto, persekutadis la Kristanojn. Tiuj ĉi amasiĝis en la katakombojn dum tiu nokto por memori la datrevenon de Kristnasko. Tiel, „*unuafoje*” en la tuta mondo, tiu Papo Aleksandro la Unua celebris la *unuan noktan Meson*. de poste tio iĝis tradicio.

496. Dum malfacilaj streĉaj bataloj, Klodvigo la Unua, baldaŭ reĝo de Franklando al DIO petis la venkon kaj promesis kristaniĝi, je instigo de sia edzino Klotilda.

La venko okazis. Tial en la festo de Kristnasko en 496 la urbo Reims, plena de bruoj kun la stratoj ornamitaj per pentritaj ŝtofoj, ŝajnis paradiza loko. En la preĝejo la incensiloj eligis odorfumon; estis do solena tago!

La episkopo Sankta Remigo baptis Klodvigon kaj 3.000 soldatojn.

800. Kiel Romano vestita per longa robo, Karlo la Granda ĉirkaŭita de siaj grafoj eniris la nartekson de la Baziliko Sankta Petro en Romo. Atendis lin Leono la Tria, la novelektita Papo. Laŭrite, Lia Papa Moŝto ĉirkaŭbrakis lin. Tra la klostro, kie murmuradis belega fontano, procesie ili iris antaŭen kaj eniris la bazilikon, kies navo estis ornamita per oraj kaj purpuraj tapiŝoj: super la altaro sur la baldakeno brilis luma kruco farita per 1370 vakskandelegoj.

Karlo ekgenuis. Dum li fervore preĝis, li sentis sur sia kapo ion pezan kaj malvarman, ja kiel Imperiestron de la Sankta Romia Regno Lia Papa Moŝto lin kronis. Oni akklamis lin; dum la ĥoro kantis laŭdajn kantojn, Leono la III-a genuflekse omaĝis al la nova Imperiestro, kaj poste celebris la Sanktan Meson: estis Kristnasko en la jaro 800.

1792. Malĝojis Parizo en tiu tago de Kristnasko 1792! Laŭ la propono de iu S-ro Chaumette (ŝomet) la komunuma estraro ordone fermigis ĉiujn preĝejojn ekde la 5-a horo vespere je la 24-a de decembro ĝis la 6-a matene de la 25-a. Senkompate oni proskribis la noktmezan Meson, diritan restaĵo de egiptaj orgioj. Sed en multaj kvartaloj spite al la ordono la kompatinda pariza popolo eniris la preĝejojn: la Meson celebris jurligitaj sacerdotoj, oni ruze trompis la urbajn oficirojn. Tamen, ve! ... en tiu nokto la sonoriloj ... silentis!

1800. En 1800 la 3-an de nivozo, alidire la 25-an de decembro, la Unua Konsulo veturis al Operdomo por ĉeesti la unuan prezentadon de „La Kreado” far Haydn. Kiam eniris la veturilo mallarĝan strateton, eksplodis subite bombego, kaŝita en la ĉareto; malaperis kaj la ĉevalo kaj la ĉareto, falis sur la straton pli ol kvardek viktimoj.

Spite la esploradon de la polico, unu el la konspirantoj, la kavaliro de Limoelan, eskapis kaj sukcesis atingi Amerikon. Ĉar tie li estis tute ne konata ne malhelpis, ke li sacerdotiĝis. Ĉiujare admiregis la monaĥinoj, kies kapelestro li estis, la emocian piecon, kiun li montris, celebrante la sanktan Meson en la nokto de Kristnasko.



1886. Traserĉante emocion ne pian sed poezian, dek-ok jara junulo eniris la katedralon „Notre-Dame” en Parizo. Perdite en la moviĝanta amaso, li aŭskultis laŭtan Meson; kaj posttagmeze li ĉeestis la vesprojn. Blankvestita la ĥoro de la preĝejo Sankta Nikolao kantis psalmon...

„Pli poste mi eksciis, ke tiu ĉi psalmo estas la *Magnificat*,

„ĉar ĝuste en tiu momento estis mia koro

„samtempe tuŝita kaj ŝanĝita”.

Dum oni kantis *Adeste fideles*, flugis larmoj sur lian vizaĝon: tio okazis la 25-an de decembro 1886.

Nu, en la vespero mem Paŭlo Claudel hejme legis paragrafojn en la Biblio, pruntedonita de lia fratino Kamila; kaj pli poste ĉi tiun libron li kutime kunportis kaj ĉiutage legis dum ĉiuj siaj malproksimaj kaj diplomataj vojaĝoj.

Tamen, nur post kvar jaroj kaj post multaj, longaj, intimaj hezitoj li faris sian pekkonfeson, kaj je la 25-a de decembro 1890 li ricevis la „duan” komunion en sia vivo.

1942. En plena dezerto kampadis Generalo Leclerc kun la Unua Armeo ĉe la oazo *Uig-el-Kebir*. Post longaj, rapidaj marŝoj *de la Tĉhad-lago*, (*ĉad*) en Norda Afriko ili ĵus alvenis por batali kontraŭ la germana generalo Rommel. Estis la 24-a de decembro 1942. Generalo Leclerc deziris respekton de militpaŭzo en la Sankta Nokto. Tiam ĉiuj preĝis kaj revadis pri foraj noktoj de Kristnasko. Sed la morgaŭan vesperon ili ĝisiris la „*Afrika Korps*”; kaj tiam komenciĝis la bataloj, kiuj de etapo ĝis etapo liberigis plurajn landojn, inter kiuj la francan.

1945. Je la 9-a de aŭgusto 1945 falis la unua atombombo sur *Nagasakon*, kaj la antaŭurba preĝejo de *Urakimi* estis... ve! kiel multaj aliaj, tute cindrigita!

Kvazaŭ mirakle preskaŭ sen difekto restis nur unu sonorilo. Kvar monatojn poste, sur skafaldon pene suprenlevis la sonorilon profesoro *D-ro Takashi Nagai*, ĉe la medicina fakultato, kun kelkaj loĝantoj, kiel li savitaj, kriante: „*Eya! Eya!*” Estis la 24-a de decembro 1945; en tiu nokto, kaj el tiu provizora sonorilturo, sonoris kvazaŭ renaskiĝa kanto de la japana urbo... la unuan fojon post la militfino.

*kolektis Julieta.*



## Ĥnoncetoj

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj kun gejunuloj: 17-jara junulo *Omer Fockedey*, Reigerloostraat 10, en *Bcernem (W.VI.) Belgujo*. \*

Teologia studento deziras korespondi: *Kazimierz Malyszko*, ul. *Slonimska* 8 m. 2, en *Bialystok, Pollando*.

*La Internacia Katolika Informejo* donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan gazeton „*Vojo, Vero, Vivo*”. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la sekretario de I.K.I. *Gasthuisstr. 68, TILBURG*, poŝtkonto 268507. Por eksterlandanoj la adreso estas: *Sac. H. Roosen, redaktoro VVV, Huize „St. Gerlach”, HEER (L), Nederlando*, poŝtkonto 134120. Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj reprezentantoj de IKI kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn.

## LI VENIS, LI VENIS !

La instruistino kiu instruis en la elementa lernejo estis pasia, fervora ateistino: ŝi volis elŝiri Dion el la mensoj kaj el la koroj de la infanoj... Simpla estis ŝia programo: modli sendiajn animojn. Sinjorino Gertruda — tiu estis ŝia nomo — sciis ke ŝi estus devinta lukti kontraŭ la familioj de la infanoj, vere kunligitaj al la Fido kaj al la kultoj.

La paroĥestro donis al la infanoj lecionojn de katekismo kaj ilin admonadis al ofta ricevo de la sakramentoj.

Strange, sinjorino Gertruda ŝajnis dotita per mistera flaro, kiu konsentis al ŝi eltrovi la infanojn kiuj matene estis ricevintaj la S. Komunion; en la lernejo ŝi afliktadis ilin ĝislarme.

Anjo, dekjara knabino, estis la plej bela kaj la plej inteligenta el siaj kunulinoj kaj tiu, kiu per sia ekzemplo ilin ĉiam subtenis.

Ĉiutage ŝi komuniigis kvankam sciante ke tio estus kontraŭ si koleriganta la instruistino. „La tagojn kiam mi komuniigas, ŝi diris al sia paroĥestro, mi sentas min pli forta!”

Sinjorino Gertruda vidadis en ŝi nevenkeblan reziston kaj, por ŝin konfuzi, ŝi uzis pli grandan lertecon en la rezonado kaj ĉiujn argumentojn de la nekredantoj.

Kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko, la 17-an de Decembro, la instruistino venigis Anjon: ŝi volis, kvazaŭ per kruela ludo, doni finan baton al la superstiĉoj kiujn difektegis la klason.

„Diru, mia etulino, (la voĉo kaj la manieroj estis strange dolĉaj) kion vi faras, kiam viaj gepatroj vokas vin?” „Mi alkuras” respondis la knabino.

„Ĝuste! Vi aŭdas ilin kaj vi tuj alkuras kiel obeema knabino. Kaj kio okazas kiam viaj gepatroj vokas la kamenskrapiston?” „Li venas” respondis Anjo. Ŝia eta koro batadis forte: kion celis la instruistino? „Bonege, mia etulino! La kamenskrapisto venas ĉar li ekzistas”. „Ŝiaj okuloj briladis kiel tiuj de kato ludanta kun rato”, diros poste lernantino al la paroĥestro.

Sekvis momento de silento.

„Bone, vi alkuras, ĉar vi ekzistas. Sed ni supozu ke viaj gepatroj voku la avinon, kiu jam mortis. Ĉu vi pensas, ke ŝi venos?” „Ne, mi ne kredas tion!”

„Bone! kaj se vi vokas Blubarbon? aŭ Ruĝkapuceton? aŭ Azenfelon? vi ŝatas la fabelojn, ĉu ne? kio okazus tiam?” „Neniu alvenus, ĉar estas nur fabeloj.

Anjo levis siajn plenklarajn okulojn al la instruistino, sed ilin tuj mallevis: la rigardo de sinjorino Gertruda doloris sin. „Tre bone. Do vi vidas, miaj infanoj, ke respondas al la alvoko nur tiuj kiuj ekzistas: kaj tiuj kiuj ne plu estas aŭ neniam estis, ne respondas. Tio estas klara, ĉu ne?” Kaj la lernantino hore kaj laŭte: „Jes!”.

„Nu, ni faros eksperimenton. Anjo, eliru el la ĉambro kaj vi alvoku ŝin!” La maldika silueto de la knabino malaperis tra la pordo.

„Anjo, Anjo!” alvokis la knabinoj. Ŝajnis vere ludo. La knabino eniris ĉiam pli hezitanta. La instruistino dozis kaj gustumis la efikojn de sia ludo.

„Do, konsentite pri tio? Kiam ni vokas iun kiu ekzistas tiu venas, kiam vi vokas iun kiu ne ekzistas, tiu ne venas kaj li ne povas veni. Anjo vivas, ŝi ĉeestas kun karno kaj ostoj; ŝi aŭdas vian alvokon kaj venas. Nun, ni supozu ĉimomente ke vi voku la Infanon Jesuon. Estas iu inter vi kiu ankoraŭ kredas al la Infano Jesuo? Tiuj mokaj vortoj enĵetis embarason en la lernejo. Poste kelkaj timemaj voĉoj: Jes, Jes.”



„Kaj vi, etulino mia, ĉu vi kredas ankoraŭ ke infano Jesuo aŭdas, kiam vi vokas Lin?” „Ja, mi kredas tion!”, impete respondis Anjo.

„Bonege! Ni vidu. Ĉu ĉiuj vidis ke Anjo eniris kiam ni vokis ŝin? Se la Infano Jesuo ekzistas, Li aŭdos vian alvokon. Alvoku Lin do, ĉiuj kune, laŭte: „venu, Infano Jesuo; kuraĝu; jen, unu...du...tri...ĉiuj kune...”

La infanoj mallevis la kapojn. En tiu bedaŭrplena silento, mokema ridado eksplodis. „Jen, kien mi volis alkonduki vin; jen mia pruvo! Vi ne aŭdacas voki Lin, ĉar vi bone scias ke Li ne venos, via Infano Jesuo:...estas fabelo!”

La knabinoj plue silentis. La argumentoj de sinjorino Gertruda profunde impresis ilin. Jes, se Li ekzistas, kial Li ne venas?

Anjo estis pala kiel tolo. „Mi timis ke ŝi svenos” rakontis poste ŝia amikino. Subite io okazis neatendite. Anjo ekkuris mezen de la ĉambro kaj kun ardaj okuloj ekkriis: „Bone, ni Lin alvokos! ĉiuj kune: „venu Infano Jesuo!” En momento ĉiuj knabinoj ekstaris, interplektitaj manoj, la koroj ŝvelintaj pro senfina espero, „Venu, Infano Jesuo!”

La instruistino surprizita reen eksaltis. Momenta silento, peza kiel agonio; poste denove la kristalvoĉeto: „ankoraŭ!”

Ekestis kriado tiela „ke estus renversinta la murojn „diris poste knabino.

Kaj tiumomente okazis miraklo.

La pordo senbrue malfermiĝis. „La tuta taglumo forkuris al la pordo (estas la knabinoj, kiuj rakontas) kaj tiu ĉi lumo „kreskis, kreskis, ĝis ĝi fariĝis fajroglobo”. Tiam ili ne havis eĉ la tempon por krei.”

La fajroglobo fendiĝis kiel nukso kaj vidigis infanon „tiel belan, kiel neniam ili estis vidintaj.”

Li ridetis neparolante. Lia ĉeestado „estis senfine agrabla” kaj la knabinoj havis ne plu timon, sed „nur grandegan ĝojon”.

Kiom tio daŭris? momenton? Horon? tiurilate la atestoj diferencas: la apero tamen ne superis la daŭron de la leciono. La Infano „estis blankvestita kaj similis al suneto”. Estis Li „kiu faris la lumon”. La taglumo kompare ŝajnis nigra. Kelkaj knabinoj estis blindigitaj pro la troa lumo, kaj la okuloj doloris ilin. Aliaj sendolore rigardadis la Infanon. Li nenion diris: nur afable ridetis. Poste Li malaperis en la fajroglobo kiu „iom post iom forsvenis”.

La pordo malrapide fermiĝis de si mem. La knabinoj silentadis nekapablaj paroli, la koroj dronintaj en nedirebla ĝojego.

Subite akra ekkrio ŝiris tiun silenton. Kiel idiotigita „la okuloj ekster la orbitoj” la instruistino kriegis: „Li venis!” kaj ekforiris forbatante la pordon.

Anjo ŝajnis eliri el sonĝo. Ŝi diris simple: „ĉu vi vidis? Li ekzistas. Nun ni danku Lin”. Kaj ĉiuj genufleksis kaj pie diris la „Patro nia”, la „Saluton Maria” kaj la „Gloro”.

Poste ili eliris el la lernejo, ĉar la sonorilo triladis kaj oni devis malsupreniri por la amuzoj. Sinjorino Gertruda estis enigita en frenezulejon pro la diagnozo „religia obsedo”. Anjo nun finis la lernejon kaj hejme helpas sian panjon kaj en sia koro sentas sin alvokita de Dio.

*Ĉi tiu historia fakto venas de hungara Patro Norberto, kiu nun loĝas en Parizo. Ĝi aperis i.a. en la franca revuo „Ecclesia”, itala „Famiglia Cristiana”, apr. 1960, kaj aliaj. — Tradukis D-ro A. F.*

---

*Por Kristnaskaj kartoj vidu anoncon sur p. 4 de la kovrilo.*

## PROF. D-RO GIORGIO CANUTO †

De U.E.A. ni ricevis la sciigon pri la subita morto, la 29-an de oktobro 1960, de sia prezidanto. Pro malsano prof. Canuto jam ne povis ĉeesti la Universalan Kongreson en Bruselo, sed li regule telefonis por informiĝi pri la evoluo de la kongreso, kaj ĝenerale regis la impreson, ke lia sanstato daŭre pliboniĝis. Tial la sciigo pri la morto de la UEA-prezidanto venis tute neatendite.

*Giorgio Canuto* naskiĝis la 3-an de junio 1897 en Torino. En 1925 li lernis Esperanton kaj jam baldaŭ estis prezidanto de la loka grupo. En 1928 li fariĝis vicprezidanto, poste prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio. Li ankaŭ estis membro de la Akademio de Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj prof. Canuto anstataŭis s-ro Malmgren kiel prezidanto de U.E.A. kies taskon kompetente kaj kun granda fervoro li plenumis.

Prof. Canuto estis eminenta sciencisto, profesoro pri medicino, eksrektoro de la Universitato de Parma. Ni esprimas nian sinceran kondolencon al s-ino Canuto kaj ŝia filo, esperante ke Dio donu al ili la forton por porti tiun dolorplenan baton kun rezignacio.

Ankaŭ kun U.E.A. kaj la Itala Esperanto-Federacio ni profunde kunsentas en ĉi tiu granda perdo.

### VALORA VERKO JE DUONA PREZO

Jam ofte ni atentigis pri la eminenta verko de nia kompetenta ĉina samideano, *Patro Johan-Baptisto Kao o.f.m.*, nuntempe ankoraŭ loĝanta en *Rio de Janeiro, Brazilo*, sed baldaŭ forironta al la ĉina insulego *Formoso*.

Temas pri la *Memorlibro de la Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno*, okazinta en la kadro de la *XXXVIa Internacia Eŭkaristia Kongreso en Rio de Janeiro*. La libro enhavas 215 paĝojn de teksto plus 75 ilustraĵojn kaj estas presita sur bonkvalita papero. Ne nur ĝi enhavas la predikojn, prelegojn ktp. dum tiu kongreso, sed ankaŭ la historion de la katolika Esperanto-movado kaj multajn valorajn artikolojn.

Estas vere bedaŭrinde, ke tia verko restis grandparte nevendita kaj ke la verkinto pro sia giganta, oferplena laboro ne akiris la simpatian kiun li meritis, sed eĉ havas gravan financon perdon! Montriĝas ke la plej granda parto de niaj katolikaj esperantistoj ne sufiĉe taksas la valoron de tia verko, kiu ankaŭ tre taŭgas por la propagando de nia movado en ekleziaj rondoj. Ofte oni plendas, ke sacerdotoj kaj ekleziaj altranguloj nenion scias pri nia movado, eĉ kontraŭlaboras: ĉu la kaŭzo ne estas, ke ni ne atentigas ilin pri la granda valoro de la internacia lingvo por la internacia Eklezio? La opinio de nesciantoj aŭ kontraŭuloj ofte favore ŝanĝiĝas, kiam serioza katolika esperantisto montras per faktoj, ke Esperanto povas efektive servi al la Eklezio: verko kiel la „Memorlibro” estas unu el tiuj konvinkiloj. Por kiel eble plej limigi la financon deficiton, Patro Kao decidis malpliigi la prezon, kaj niaflanke ni volas helpi, rezignante je ĉiu profito por nia Libro-Servo, tiel ke la prezo nun estas, la duono de la antaŭa, nome 4 ned. guld. = 16 steloj aŭ 14 int. respondkuponoj + 10% por la afranko.

Ni esperas ke nun ĉiuj kiuj ankoraŭ ne posedas la Memorlibron, aĉetos ekzempleron.

---

LA ESTRARO DE I.K.U.E. KAJ LA REDAKCIO DE ESPERO KATOLIKA  
DEZIRAS AL VI BENATAN KRISTNASKON!



## HODIAŬA LAF = MORGAŬA IKUE!

Karaj IKUE-anoj! Post nun jam dujara flugado de „Birdo” oni povas konstati kaj esperi, ke ĝi jam ne malaperos! Ĝi ekzistas kaj vivas. Jam 25 landojn ĝi traflugas! Sed tamen ĝi estas ankoraŭ malforta kaj bezonas vian helpon. Pripensu, karaj IKUE-anoj, ke la hodiaŭaj membroj de La Alta Flugo estas la morgaŭaj de IKUE! La nuna redaktoro de „Birdo” havis la honoron alparoli en Munkeno la kongresanojn; interalie li diris: „Vi plenkreskuloj estas nia espero por la nuntempo same kiel ni junuloj estas via espero por la estonto.” Kaj la vortoj ŝajne ankaŭ bone efikis. Ĉar la rezulto de posta kolekto estis ĉ. 100 gm! Do vi jam komprenas, kion mi esperas de vi: vian financon helpon por LAF kaj BIRDO.

Vi tre helpas nin per monsumo. Vi ege helpas nin pagante unu aŭ plurajn abonojn por gejunuloj en nepagipovaj landoj. Pleje vi helpas nin varbante por „Birdo” novajn abonojn! Ĉar ĝuste tiujn ni bezonas. Se ni havus 100 da pagantaj abonantoj pli, „Birdo” jam povus vivi senhelpe!

IKUE-anoj! Estu nia espero! Tiam ni ankaŭ povas esti via espero!

*La redaktoro de BIRDO:*

Abonkotizo de la monata Junulargazeto „Birdo”: 3 ned. gld. = 12 steloj jare.

Administracio: Hub. Weltens, poŝtfako 8, Schoonhoven, Nederlando.

Poŝtkonto: Admin. „Birdo”, Poŝtfako 8, Schoonhoven, Ned.

Por pluj adresoj vidu la anoncon sur la kovrilo de E.K. nov. 1960. Cetere la landaj reprezentantoj kaj la Centra Oficejo de IKUE volonte akceptos abonojn kaj donacojn por „Birdo”.

## *Por nia aktiva junularo*

El diversaj envenintaj cirkuleroj, kiujn ni pro spacomanko bedaŭrinde ne povas entute lokigi, ni eksciis pri kelkaj Esperantistaj Ferioj por la junularo. Ni donas la plej necesajn informojn kaj la adresojn, do oni povas elekti kaj tuj skribi por akiri pluajn detalojn:

*ESPERANTISTA SKIFERIO ADELBODEN, SVISLANDO* de 24.12.1960 - 2.1.1961, en la Bernaj Alpoj. Aĝo ek de 16 j. *Loĝejo* en bela alpa lignodomo kun pajlomatracoj kaj litoj; ĉiuj helpos ĉe kuirado kaj purigado. *Programo*: skiekskursoj, glitŝuado, ekskursoj, festoj, ĥoroj, orgenkoncerto, prelegoj, prezento de kolorkliŝoj pri pasintaj skiferioj.

*Prezo*: por la tuta restado 95 svis. fr. = 320 steloj, ĉio enkalkulita. *Adreso*: *ESPERANTO, LA SAGNE (NE), SVISLANDO*. Nur Esperanton parolantoj estas allasitaj.

*SKIFERIO KAJ SKIKONKURSO DE T.E.J.O. en FILZMOOS, Aŭstrujo*, de 26.12.60 - 8.1.61. *Prezo*: 680 aŭstr. ŝil. Eventuale de 26.12 - 2.1. aŭ de 2.1. - 9.1.61, do 7 tagoj por 410 aŭstr. ŝil. Por la konkurso krompago de 15 ŝil. Skioj kaj skiŝuoj lueblaj. *Adreso*: *Heinrich Reiter, Altmannsdorferstr. 90/1, Wien XII*.

Ĉar la tempo jam urĝas, partoprenontoj tuj anoncu sin, pagante samtempe proks. kvaronon de la kostoj.

*ZAMENHOFA RENKONTIĜO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA BRITA* de 15.12 - 19.12.60 en la junulargastejo de *Lostwithiel, Cornwall*, (Sudokc. Anglujo). Kostoj inkl. manĝojn, tranoktojn, ekskursojn ktp. 3 anglaj funtoj. *Adreso*: *H. R. Tonkin, St. John's College, Cambridge, Anglujo*. Petu tuj informojn pri vojaĝo ktp.

## LA STELO BETLEHEMA – SOLA SAVO!

*Desegno de Clemens Schmidt*



Al la luno, al la stela sfero  
Celas homo nun esplor-ebria,  
Sklavo de deĵoro materia,  
Dume en mallumo ĝemas tero. —

Fierega pri triumf' teknika  
Homo hom-farajon laŭte gloras,  
Jen idolojn sekvas kaj adoras;  
Grave mankas nur progres' etika!

Sumojn tre gigantajn li fordonas  
Por eksperimentoj, en esenco  
Nur servantaj al militpotenco,  
Dum amasoj en mizero dronas. —

Vaste regas eĉ spirit-malhelo  
Malgraŭ lunraketoj radiantaj;  
Ciuj vetkonkuroj restas vantaj! —  
Sola savo: B e t l e h e m a S t e l o!

*Walter Mudrak, Vieno.*

### U R Ĝ A A L V O K O

Proksiman jaron okazos de 31.2 - 3.4. kunveno de la „*Mondfederacio de la Kongregacioj de Nia Sinjorino*” en Parizo (angle: World Federation of the Sodality of Our Lady).

Kiuj samideanoj, prefere partoprenontaj en la kunvenoj, volas propagandi tie la uzadon de Esperanto, pere de diverslingvaj flugfolioj — *senpage haveblaj!* — kiujn ni tiucele presigis?

Bonvolu skribi al: *s-ro Rik de Roover, Luchtvaartstraat 28, Borgerhout-Antwerpen, Belgujo*. Ne forgesu mencii la deziritajn lingvojn (francan, anglan, germanan, hispanan, italan) kaj la kvanton de qiu lingvo. — Antaŭdankon!

### NI GRATULAS

*F-ino C. A. G. Marquering*, eksinstruistino de katolika knabina mezlernejo, membro de IKUE kaj multjara esperantistino, kiu antaŭ kelkaj monatoj estas pensiigita, ricevis la papan distingilon „*Pro Ecclesia et Pontifice*” pro siaj grandaj meritoj por la instruado. Ni tutkore gratulas nian samideaninon, kiu ankoraŭ ne tute ripozas, ĉar ŝi okupas parton de sia tempo por instrui Esperanton, kaj ni deziras al ŝi ankoraŭ multajn belajn jarojn en bona sanstato. (Adreso: *Westerkade 21, Groningen, Nederlando*).



# 46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate - 5-12 aŭgusto 1961 - Britujo

**Korespondadreso :** 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.  
**Telegrafo :** Esperanto Harrogate.  
**Banko :** Midland Bank Ltd. Harrogate

**N-ro 2**

**OFICIALA KOMUNIKO**

**novembro 1960**

**GLUMARKOJ :** La Loka Kongresa Komitato eldonis kvarkoloran glumarkon kun emblemo de la 46-a Universala Kongreso. La glumarkoj estas aĉeteblaj ĉe la Kongresaj Perantoj, ĉe la Libro-Servoj kaj Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. kaj ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate je prezo de po 1 ŝilingo kaj 6 pencoj por folio de 25 markoj. (4 steloj).

**BAZA ARTIKOLO :** Baza artikolo pri la kongresa urbo kun enciklopediaj notoj pri Britujo estas senpage havebla — por informvesperoj ĉe lokaj societoj — rekte de la Kongresa Oficejo.

**SONBENDO :** Lokaj Esperanto-societoj, regule aliĝintaj al Landaj Asocioj, povas senpage ricevi de la Kongresa Oficejo 30-minutan sonbendon por grupaj vesperoj. La sonbendo enhavas intervjuon kun la Prezidanto de L.K.K., paroladon de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A., alvokon de esperantista infano kaj muzikan programon.

**FAKAJ KUNVENOJ :** Fakaj asocioj, dezirantaj okazigi fakajn kunvenojn dum la Universala Kongreso, estas petataj informi pri tio la Kongresan Komitaton ĝis la 31-a de decembro 1960.

**SENPAGAJ PARTOPRENOJ :** Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

**T.E.J.O.-KONGRESO :** La Estraro de T.E.J.O. informas, ke kontraŭe al la antaŭa anonco la 17-a T.E.J.O.-Kongreso okazos en Wokingham (Britujo) de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto 1961.

**ANTAŬKONGRESO :** Samtempe kun la Seminario „Oriento-Okcidento”, okazos en Londono de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961 la oficiala Antaŭkongreso, sub aŭspicioj de U.E.A. kaj de la Londona Klubo.

**HONORA PROTEKTANTO :** Lordo Boyd Orr, Nobel-pacpremiito, akceptis esti la Alta Protektanto de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto.

**STATISTIKO** (ĝis fino de oktobro): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 9, Brazilo 4, Britujo 83, Bulgarujo 2, Danlando 5, Finnlando 3, Francujo 26, Germanujo 10, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Israelo 3, Italujo 7, Japanujo 2, Jugoslavio 12, Monako 4, Nederlando 7, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 6, Svedujo 13, Svisujo 5, Usono 1. (Entute 215 el 26 landoj. Pasintjare 174 el 28 landoj).

G. C. FIGHIERA,

Konstanta Kongresa Sekretario.

## KRISTNASKO EN GRECCIO

Sacerdoto Johano Velito legis kun emocio kaj ĝojo, iun adventan tagon de la jaro 1223, leteron de Francisko Bernardone el Asizo. La sankta amiko de Dio, de la homoj kaj la bestoj skribis: „Se vi, Johano, volus, ni povus kune festi la memorigon de Kristnasko. Mi dezirus foje vere travivi la sanktan misteron de la naskiĝo de la Betlehema Infaneto. Do se vi konsentas, preparu ĉion tiel, kiel ĝi estis en Betlehemo. Serĉu lokon proksime de montoj, meze en arbaro; starigu trogon kun fojno; klopodu, ke tie estu bovo kaj azeno, kiel tiam en Betlehemo.” La preposto de Greccio aranĝis ĉion ekzakte kiel Francisko al li ordonis. Kaj jen la Sankta Nokto komenciĝis. En majesta silento kuŝis la mondo; milionoj da steloj orumis la ĉielan tendon, etenditan super la arbaro en Greccio. El la urbo, el la proksimaj vilaĝoj, el paŝtistaj kabanoj rapidis la homoj. En la malhela nokto flagris la lumoj de lanternoj kaj torĉoj, kunfandiĝante kun la brilo de la steloj, tiel ke oni ne povis distingi, kie estas la ĉielo kaj kie la tero.

Ĉiuj rapidis al la herbejo, kiu troviĝis en la mezo de la arbaro: la Fratoj-Minoritoj en brunaj monaĥaj vestoj, paŝtistoj de la montoj, urbanoj, viroj kaj virinoj kun infanoj sur la brakoj. Ili ekvidis trogon plenigitan de fojno, kaj apude bovon kaj azenon ripozantajn trankvile en kvieta revado. Proksime de la trogo troviĝis altaro, elkavigita en la roko. La kunvenintoj pendigis la lanternojn sur la neĝkovritajn branĉojn de la arboj kaj ekstaris ĉirkaŭ altaro kaj trogo, kun torĉoj en la manoj.

La preposto Johano Velito komencis celebri la sanktan Meson kaj la horo de la filoj de Francisko el Asizo ekkantis la Eniran kanton: „La Sinjoro diris al Mi: Vi estas mia filo, Mi Vin hodiaŭ generis.”

En la nokta silento disvastiĝis la vortoj de la inspirita psalmo ĝis alte sub la ĉiela arkaĵo, resonis de la rokoj kaj revenis eĥe al la homaj koroj, vekante en ili la konscion, ke jen ili estas atestantoj de la plej granda mistero de la Kredo: de la eterna generado de la Dia Filo, pri kiu la Patro mem atestas.

Silentis la vortoj de la Enira kanto, la vortoj de la Preĝo anoncanta ke Dio-Patro „tiun plej sanktan nokton heligis per brilo de vera lumeco”, kaj tiam la subdiakono per la vortoj de la Epistolo, elektita el la Letero de sankta Paŭlo al Tito klarigis al ili la signifon de la Mistero. Per la naskiĝo de Jesuo Kristo estas rimarkebla la nemezurebla amo de Dio, al kiu ili kredas kaj sur kiu baziĝas ilia tuta espero. Francisko kiel diakono, per sia sonplena kaj melodia voĉo kantis la Evangelion laŭ sankta Luko, anoncanta la naskiĝon de la Dio-Homo el la plej pura Virgulinino. Kiam li estis fininta, li turnis sin al la kredantoj kaj komencis sian predikon pri la gracoj de la silenta kaj sankta nokto.

„Miaj gefratoj! Vi alvenis tien ĉi por honori Jesuon, la Filon de Dio. Alvenigis vin la infana ĝojo de la betlehemaj paŝtistoj, la humileco de tri saĝuloj, la adoro de ĉielaj anĝeloj kaj la amo al la plej sankta Patrino. Vi ekstaris antaŭ la benata lulilo, el kiu originas ĉiu graco kaj paco. Ne timu, alproksimiĝu: tie ĉi ja hodiaŭ anoncas sin al ni la plej granda amo.”

Subite ekploris infaneto sur la brako de unu el la patrinoj.

„Fratino!” — diris Francisko — „sajnas ke via etulo frostiĝas. Metu ĝin en la trogon. Ne timu, via infano estas ankaŭ Dia infano kaj memorigos al ni la malgrandan Jesuon.”

La patrino alproksimiĝis al la trogo, enmetis sian infanon, zorgeme kovrante ĝin per tuko kaj fojno.

„Karaj gefratoj!” — daŭrigis sian predikon Francisko, — Maria metis sian filon




en la trogon sur fojno kaj jen tie ĉi renoviĝas antaŭ ni la miraklo de la betlehema nokto. Ĉie devas esti Betlehemo!" — Francisko kriis — „tie ĉi en la arbaro de Greccio, en viaj vilaĝoj, en viaj domoj, en monaĥejaj ĉeloj, en paŝtistaj kabanoj. Ĉie devas ekstariĝi trogo kaj altiri la homan koron al Jesuo. Rigardu, kiel ĉi tiu Betlehema Nokto estas lumigita per la brilo de mirinda heleco. Jen en ĝiaj radioj aperas al ni la Savanto admirinda, konsilanta, kiel Dio, Forto, Pacprinco, kiel la Vorto Ĉiopova de la Patro, per kiu fariĝis ĉio kio ekzistas: la venko de l' bono super la malbono, de la vero super la eraro, de la lumo super la malheleco! Ĝoju, gefratoj! Ĉar tie ĉi tiu Dia Filo okulvideble naskiĝos per la altarmistero kaj venos en viajn korojn."

Li ankoraŭ pli multe diris al ili kaj liaj vortoj estis kiel lumo penetranta iliajn animojn.

Kiam poste okazis la alisubstanciĝo kaj sacerdote Johano per sonorilsono salutis la sanktan Korpon de Kristo, ĉiuj sciis ke la Filo de Dio denove venis en ilian mezon, por partopreni ilian ĝojon, suferon, mizeron kaj penadon.

*Verkis. Sac. J. Kobylnicki, en „Gość Niedzielny”;  
Tradukis: Jan Tomanek, Chorzow-Batory, Pollando.*

## KRISTNASKO ĈE LA INDIANOJ



*La Huron-Indianoj en sia maniero formis „kristnaskajn kabanojn” jam ek de la jaro 1640. La Saĝuloj estas „ĉeĝoj el malproksimaj landoj” kiuj alportas donacojn el la formo de ŝeloj kaj peltoj. Maldekstre staras ĉeĝo el Manitulino, Ottawa. Apud li staras klana ĉeĝo el la Nordo. Tumika ĉeĝo „Surturiwa”, kio nun estas Florido, genuas. Migrantaj ĉasistoj de la Naskapi-gento el regiono norde de la S. Laŭrenco-rivero reprezentas la paŝtistojn.*

*La foto estas laŭ bildo en la Huronia Muzeo en Midland, Kanado.*

## ESPERANTO VIVAS



**AŬSTRUJO:** En oktobro pasinta okazis *Viena Esperanto-Tago* kun laborkunsido de aktivuloj kaj raportoj pri la nunjaraj Universala kaj fakaj resp. landaj kongresoj, kiujn partoprenis aŭstriaĵoj. Pri la IKUE-kongreso en Munkeno referis *S-ano Mudrak*.

**AKLE,** *Wien* je 25.X. festis la tagon de la aŭstria flago (prelegoj, pritraktoj, kantado de la aŭstria ŝtata himno en Esperanto (trad. *s-ino Chr. Siedl*) kaj de la „Espero“.

8.XI. omaĝo al la S. Patro Johano XXIIIa je la 2a datreveno de lia kronado, kaj salutado al la nova katolika Esp. grupo en Romo. Je la 22.XI. okazis speciala memorkunveno i.a. pri la meritplenaj mortintaj s-anoj *Carl Gasperini* kaj *Leopold Huber* (en kadro de AEF).

**Gazetaro:** Aperis artikoloj pri nia 4a *Eŭkaristia Esp. Mondkunveno* en Munkeno en proks. 10 gazetoj (semajnaj, monataj resp. tag-jurnaloj), parte helpe de l' fervora s-ano *Karl Dürschmid, Klagenfurt*. \*

**FRANCUJO.** La 13-an de aŭgusto geedziĝis en *Romans* esperantista paro, membroj de la grupo „Bona Stelo“, unu el la plej grandaj kaj fervoraj de Francujo. *F-ino N. Romanat*, komunuma konsilistino, ornamita per la trikolora urbestra zono, geedzigis la paron, laŭleĝe prononcante la oficialajn vortojn en franca lingvo. Tamen, *f-ino Romanat* estas ankaŭ esperantistino, membro de la sama klubo, kaj tial ŝi tuj poste alparolis la paron kaj la multajn ĉeestantajn klubanojn en Esperanto. La loka gazeto, kiu sub grandaj kapoj raportis pri la neordinara afero, kun foto de la deĵoranta urbestra anstataŭantino, ne menciis la nomon de la novaj geedzoj, sed nedirekte faris propagandon por nia movado! Ni gratulas la nekonatan paron kaj esperas ke *f-ino Romanat* povos ligi ankoraŭ multajn samideanojn per la edzecaj ligiloj. \*

**BRAZILIO.** La Esperanto-grupo *SEMO* de la *Seminario Sacramentino en Monte Santo de Minas*, pri kiu ni jam raportis sur p. 173, organizis belan feston je la 4-a de sept. pasinta, pro la unujara ekzistado de la propra revueto. Ĉeestis la urbestro, *s-ro Olinto Paŭlino da Costa*, kelkaj urbaj konsilistoj, 15 geprofesoroj de la urba gimnazio, ses profesoroj kaj ĉiuj studentoj de Monte Santo, entute 120 personoj. Oni parolis en kaj pri Esperanto, prezentis teatraĵojn en nia lingvo, kaj la seminariana ĥoro kantis la oficialan himnon „La Espero“. La urba konsilisto *Wilson Parisi*, kaj la Rektoro de la Seminario, *sac. Leone Damiani*, kiu mem pentris la festprogramon, kaj *sac. Hélio Grande Pousa*, la nuna direktoro de la Novicejo, entuziasmige alparolis la ĉeestantaron. Post la fino de la festo pluraj profesoroj petis la prezidanton, kiel eble plej baldaŭ organizi kurson, ĉar ili ankaŭ volas lerni Esperanton.

La prezidanto de la grupo, *Frato Severiano de Souza S.S.S.*, nun ĉiusabate prelegas pere de *Radio Progresso* je la 16a horo, kaj duonhore ĉiusemajne gvidas Esperanto-kurson antaŭ la mikrofono de tiu radiostacio, laŭ invito de unu el ties direktoroj, kiuj ĉeestis la feston.

La Rektoro de la Seminario enkondukis Esperanton kiel devigan studlingvon. Ekspozicio, aranĝita de la studentoj, estis multe vizitata. La 5-an de sept. la urbestraro unuanime aprobis la inaŭguron de Esperanto-Placo.

La Patro Provincestro de la Kongregacio de S. Sakramento en Brazilo, sincera simpatianto de la internacia lingvo, ĉiam petas informojn pri la progreso de la seminaria klubo kaj donis permeson al *Frato de Souza*, esperantigi la biografion



de *Beata Petro Juliano Eymard*, fondinto de la Kongregacio.

La seminarianoj fervore klopodas, entuziasmigi ankaŭ aliajn brazilajn seminariojn por nia movado. Ni deziras al ili grandan sukceson!

La anoj de la „SEMO Esperantista Movado,” Seminário Sacramentino B. Eymard, Poŝtkesto 34 *Monte Santo de Minas, M.G. Brazilo*, petas korespondantojn. Skribu amase al la klubo, por instigi la fervoron de la membroj! \*

*POLLANDO* — En la urbo LUBLIN, ĉe la Universitato Katolika estas fondita Scienca Esperanta Rondo, kiun gvidas *Fino Eligia Sitek* kiel prezidantino kaj *Patro Kazimiro Dynda S.A.C.* kiel Vicprezidanto. — Imitinda iniciato kiu meritas nian plej varman apogon. La esperantistoj penu propagandi Esperanton ĉe aliaj katolikaj Universitatoj en la tuta mondo. Skribu al la Katolika Universitato de LUBLIN kaj petu gekorespondantojn aŭ pliajn informojn.

### *Katolika Esperanto-centro en Romo*

Je la festo de Kristo-Reĝo, la 29-an de oktobro ĉ.j. la katolikaj Esperantistoj de Romo, kiuj jam regule kunvenis por ĉeesti S. Meson kun Esperanto-prediko fare de *Patro Giacinto Jacobitti O.P.* en la kripto de la internacia pacpreĝejo „Kristo Reĝo”, solene inaŭguris la oficialan fondon de sia „Esperanto-Centro”. Patro Jacobitti celebris la S. Meson, predikis en Esperanto kaj disdonis bildeton de Kristo-Reĝo kun dorsflanke presita himno „Ni volas Dion”. La grupo nombras 60 anojn, sed oni esperas baldaŭ pligrandigi ĝin.

La prezidanto de la Centro estas Prof. Kohler (sur la foto en la centro de la pordo, en la lasta vico) germano; sekretariino estas lia itala edzino, Prof. Kohler - Antonelli (dekstre en la unua vico, kun nigra vesto). En la unua vico staras Patro Jacobitti. La foto montras aron da klubanoj post la supre menciita sankta Meso.

La membroj de la Centro fervore laboros por prepari la 29-an IKUE-kongreson en 1962, pri kiu sekvos detaloj.





29. *Enketo ĉe la deputitoj de la Eŭropa Konsilantaro.* El „*General-Anzeiger der Stadt Wuppertal*” 21an de okt. 1960 (s-ro Kronshage): Ekde la komenco de la venonta jaro en Strasburgo la *lingva Babelo* estos iom pli(!) ordigita. La deputitoj kaj aŭskultantoj en la ĝen. Kunveno de la Eŭropa Konsilantaro tiam povos ĉe siaj sidlokoj per kapaŭdiloj aŭskulti tri diversajn lingvojn. Al la du oficialaj lingvoj angla kaj franca nun la germana aliĝos kiel laborlingvo. Tio signifas: ĝi estas uzata en la ĝen. Kunvenoj tiel kiel ĝis nun la ambaŭ aliaj „grandaj” lingvoj. La sama validas en la komisionoj, escepte se unuvoĉe oni decidas ne traduki en tiun aŭ alian lingvon. La dokumentado de la sesioj ankaŭ estonte nur aplikas

la francan kaj anglan lingvojn. Oni timas nuntempe ankoraŭ la altajn kostojn de kroma paperalfluo...(!)

*Ok lingvoj estus necesaj.* Per ĉi tiu nova ordigo sukcese estis kronataj klopodoj el la jaro 1952. Jam siatempe itala deputito (Azara) petis aprobi la germanan, anglan, francan kaj italan lingvojn kiel oficialajn lingvojn de la Eŭr. Konsilantaro. La planoj ĉiam denove ne estis akceptataj. Du aferoj en tio ludis rolon: unue la deputitoj de la malgrandaj membroŝtatoj postulis ke tiam ankaŭ ilia lingvo estu konsiderata; kaj oni konstatis ke ok lingvoj estus necesaj por kontentigi ĉiujn dezirojn. Due el prikalkulo rezultis tiom da pliaj kostoj, ke neniu povus transpreni la respondecon. Aliflanke komparo kun la du aliaj eŭropaj parlamentaj kunsidoj montras, ke la Eŭr. Kons. fakte estis ne progresinta. Ekzemple la Eŭr. Parl. de la Ekonomiaj Komunumoj (EPEK) aprobis krom siaj oficialaj lingvoj la kvar lingvojn (francan, germanan, nederlandan kaj italan) kiuj estas parolataj en la ses membrolandoj. La Kunv. de la Okcidenteŭr. Unuiĝo siaparte krome akceptis la anglan lingvon kiel oficialan, ĉar krom la reprezentantoj de la ses EPEK-popoloj ankaŭ anglaj deputitoj estas en ĝi. La Eŭr. Konsilantaro limigis sin ĝis nun je 2 lingvoj malgraŭ la fakto ke ĝi konsistas el 15 membrolandoj.

*La demandaro.* La decido de la Konsila Kunv. akcepti nun ankaŭ la germanan lingvon kiel laborlingvon baziĝas i.a. sur la surpriza rezulto de enketo, pere de demandaro kies iniciatoro estis la aŭstra deputito Strasser. La membroj de la Konsila Kunv. estis demandataj, kiujn lingvojn ili parolas, kiujn ili komprenas kaj kiŭ estas ilia gepatra lingvo. El la 249 deputitoj (132 laŭregulaj membroj, 117 anstataŭantoj) respondis 193.

*Deputitoj estas lingvotalentaj.* La enketo donis jenan rimarkindan bildon: La francan lingvon komprenas 135 membroj, parolas 103 kaj estas la gepatra lingvo de 43. La respektivaj nombroj por la angla lingvo estas: 131, 100 kaj 29; por la germana lingvo: 113, 90 kaj 45. En relative granda distanco sekvas la skandinavaj lingvoj, kiujn komprenas 42 deputitoj kaj parolas 41; la samaj nombroj por la itala lingvo estas: 36 kaj 24. Ĉi tiu rezulto ŝajnas pravigi, provizore nur akcepti la germanan lingvon kiel pluan laborlingvon.

Pro la aliaj lingvoj cetere prezentis sin praktikaj malhelpoj: montriĝis neeble trovi interpretistojn, kiuj estas kapablaj dum la debatoj simultane traduki la norvegan lingvon en nederlandan aŭ la svedan en italan.

Por ke la lingva problemo en la Eŭr. Konsilantaro ne serioze ĝenu la laboron, en estonto ankaŭ la nederlanda, itala kaj la tri skandinavaj lingvoj (dana, norvega kaj sveda) estas allasataj por la debatoj, resp. paroladoj. Ilia traduko en la tri



laborlingvojn germanan, francan kaj anglan estas afero de la koncernaj delegitaroj; do ili devas disponigi la interpretistojn.

30. *Olimpiada anekdoto.* La brita kuristo Stan Vickers, kiam li post la streĉega 50-k.m. irado faligis sin sur la herbejon, tuj estis levata de du sanitaristoj, kiuj transportis lin en iun malsanulejon de Romo, kie lin post unuhora serĉado retrovis la britaj sportfunkciuloj. La sanitaristoj ne povis kompreni la sportulon, kiam li — kiu ne scipovis la italan lingvon — certigis ilin, ke al li absolute nenio okazis! (Tradukis sro Kronshage el Westdeutsche Rundschau de 8.9.'60.)

Sendu viajn interesajn al

sac. C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.

## KATOLIKA LITERATURO EN ESPERANTO

Dum la nun pli ol 70-jara ekzistado de Esperanto, ankaŭ katolikoj partoprenis la movadon; ankaŭ ili partoprenis la disvastigon de la Esperanto-literaturo; ankaŭ ni havas niajn revuojn, kun atentindaj artikoloj kaj pristudoj. Sed eble jam venis la tempo por pliriĉigo de la katolika literaturo en Esperanto.

Ĉiu el ni rigardu, kiom vasta en sia lingvo estas la katolika verkaro: li tiam bedaŭros, ke tiom da gravajoj ankoraŭ ne ekzistas en Esperanta vestaro.

Kelkaj demandoj ja leviĝos pri la temo: Kio estas katolika literaturo? Kion verki aŭ traduki? Ĉu, cetere, ekzistas verkantoj aŭ tradukantoj? Kiamaniere eldoni la verkaĵojn?

Mi ne dubas, ke almenaŭ kelkaj el niaj anoj jam pripensis tion. La respondo al la supraj demandoj, kaj al la aliaj tiuflankaj, ne povas, ne devas esti simpla forrezigno. Tutcerte, IKUE-estraro ĝojus ekkoni la opinion de ĉiuj. Tiuj respondoj permesus starigi planon, arigi la dissemitajn fortojn kaj volojn, kaj ekvidi la plugotan grundon.

Kiu deziras preparoli la temon?

G. Véron.

*Pri la supra artikolo, bonvolu la interesiĝantoj rekte rilati kun la verkinto, kiu raportos al IKUE. (Adreso: S-ro G. Véron, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne) Francujo.*



**GODELIEVE LA NOBELINO DE GISTELO**  
de F. R. Boschvogel. Tradukis: Fratoj Arni Decorte kaj Leotadio de Ruyver, F.C. Eldono de la Fratoj de l' Karitato, Bierbeek, Belgujo. — 21 × 14 cm. 36 p. Prezo 2 int. resp. kup. — La biografio de la ĉarma flandra sanktulino, kiu mortis en la jaro 1070, estas parte historio, parte legendo. Lingvo kaj stilo estas bonaj; ni nur faras la rimarkon, ke estas preferinde aldoni la prononcon de naciaj nomoj, se oni ne uzas la konatajn esperantajn nomojn, resp. klarigi aferojn kiel ekz. „houtlanda“, kion eksterlandano nek komprenas, nek scias prononci.

Ni deziras al la entreprenemaj religiuloj grandan sukceson pri la belaspekta libreto. \*

**ELEKTITAJ POEMOJ** de Castro Alves. Tradukis: L. H. Knoëdt. Eldonis: Ministerio de Edukado kaj Kulturo — Universitato de Bahia, Rio de Janeiro 1959.

— 23 × 17 cm. 186 pĝ. broŝ. kun portreto de la aŭtoro. Prezo 20 steloj = 5 ned. gld. + afranko. — La brazila poeto *Castro Alves*, kiu vivis de 1847 - 1871 certe estis granda talentulo. En sia mallonga vivo li verkis multajn bonegajn, riĉenhavajn poemojn, kiuj atestas pri la profundaj pensoj kaj vasta eruditeco de la poeto, kiu ofte montriĝas profeto. Tial la verko estas kvazaŭ farita por nia tempo en kiu tutaj popoloj, precipe afrikaj, estas en plena movo. En la Antaŭparolo *Pedro Calmon*, la Rektoro de la Universitato de Brazilo, mallonge priskribas la personon kaj verkon de la poeto, kiu ĝis nun estas unu el la plej elstaraj en la brazila literaturo. La prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo, *Carlos Domingues*, eksplikas, ke *Elektitaj Poemoj*, kiu aperas por honorigi Zamenhof en lia Centjaro, povas esti konsiderata kiel verko eldonita en la kadro de la Granda Projekto de UNESKO por la *Aprezado de Kulturoj Orienta kaj Okcidenta*; ni povas gratuli la eldonintojn, ĉar la verko vere estas inda honoro al nia Majstro, monumento en la Esperanto-literaturo, kaj certe en alta grado respondas al la celo de UNESKO. Unue ni apenaŭ atentis la nomon de la tradukinto, kiun ni ĝis nun ne renkontis en la Esperanto-literaturo, sed legante la vere ne facilajn poemojn, nia admiro kreskadis, ĉar efektive aperis nova brila stelo sur la firmamento de nia beletristiko: se *Castro Alves* estas talenta poeto, samideano *Leopoldo H. Knoedt* certe ne estas de malpli granda formato; ni esperas ke li liveros ankoraŭ multajn kontribuojn al nia literaturo. — Ni varme rekomendas la verkon al ĉiu matura esperantisto. \*

La jubilea jaro 1959 estis evidente tre fekunda en la vasta brazila teritorio: ni ricevis ankoraŭ 4 aliajn eldonojn, el kiuj 3 de la *Brazila Esperanto-Ligo*, Praça da República 54, 1°, *Rio de Janeiro*, nome:

1. **METODO ELEMENTAR DE ESPERANTO**, verkita de *Prof. C. Torres Pastorino* en kunlaboro de *Prof. Jorge Soares das Neves*, dua eldono speciale por la radio-kursoj, 19 × 14.5 cm. 224 p. broŝ. — En 20 lecionoj oni klare pritraktas la tutan gramatikon; post ĉiu leciono estas ekzercaĵoj, letero, poemo ktp. kaj vortlisto. Fine la libro enhavas resumon kun listo de la korelativoj kaj ĝeneralan planon de la elementa metodo de Esperanto.

2. **METODO ELEMENTAR DE ESPERANTO, EXERCICIOS**: 60-paĝa aldono al la suprenomita lernolibro, kun ekcercaĵoj por ĉiu leciono, plaĉaj rakontoj kaj demandaroj. La en ambaŭ libroj menciita prezo estas Cr\$ 30,— = 3 steloj: ne estas klare ĉu tiu validas por 1 aŭ 2 aŭ por ambaŭ kune; ni supozas ke temas pri aldono al kotizo por la radio-kurso. Gratulon pro tiuj bonegaj eldonoj kaj sukceson al la radio-kurso!

3. **SETENTA ANOS DE LINGUA INTERNACIONAL**: 12-paĝa broŝuro 22.5 × 16 cm. Prezo Cr\$ 10,— = 1 stelo. Ĝi estas brazillingva traduko, fare de *Geraldo Pádua*, el la angla lingvo, de la supervido pri 70 jaroj de Esperanto, de *Prof. D-ro Ivo Lapenna*. La tradukon prizorgis *Leŭtenanto-kolonelo Geraldo Pádua*. La artikolo aperis en „Brazila Esperantisto” julio-decembro 1958. — La supre menciitaj 3 eldonoj estas en portugala lingvo. \*

**ZAMENHOF, INICIADOR DO ESPERANTO**, biografio de D-ro Zamenhof. 19 × 14 cm. 175 pĝ. broŝ. Prezo Cr\$ 160 = 16 steloj. Eldonis: Pongetti, Rua Sacadura Cabral 240a, *Rio de Janeiro*, Brazilo 1959. — La biografio estas originale verkita en hispana lingvo de *A. López Luna*; la portugallingvan tradukon faris *Carlos Domingues*. La libro, kiu estas verkita en la stilo de romano, prezentas ne nur agrablan legaĵon, sed ankaŭ informas portugallinvanojn pri la kreinto de Esperanto. Ni esperas ke ĝi trovos milojn da legantoj kaj instigos ilin al la studo de nia lingvo. \*



# FILATELIO

## NOVAĴOJ POR NIA KOLEKTO „RELIGIO”

**MALTA:** Memore de la alteriĝo antaŭ 1900 jaroj de la apostolo Paŭlo ĉe la bordo de la insulo Malta aperis belega serio, kiu konsistas el la jenaj p.m.:

1½ p., verdblua kaj okrokolora. Bildo: la albordiĝo laŭ pentraĵo en la preĝejo Sta Paŭlo en La Valette;

3 p., purpura kaj blua. Bildo: episkopo Sta Publio, lerninto de Sta Paŭlo;

6 p., ruĝa kaj griza. Bildo: Sta. Paŭlo forlasas la insulon, laŭ pentraĵo en la preĝejo Sta. Paŭlo en La Valette;

8 p., nigra, oraj literoj. Bildo: statuo de la apostolo.

Teksto: „*Omnes qui in insula Labebant infirmitates accedebant et curabantur*” (ĉiuj malsanuloj, kiuj loĝis sur la insulo alvenis kaj estis resanigataj).

1 S., purpura, oraj literoj. Bildo: boato kun anĝelo.

Teksto:

maldekstre

„*In insulam*

*quandam*

*oportet*

*nos devenire*”

(Ni klopodu

alveni al

iu insulo)

dekstre

„*Melite*

*insula*

*vocabatur*”



(Malta estas nomata la insulo)

2/6 S., Verda. Bildo: Sta Paŭlo. Malfermita libro kun teksto

„*Naufragium pertuli*” (Mi ŝipopereis;

„*Pro Christi Nomine*” Pro la nomo de Kristo).

**FERNANDO-PO:** Pro la divido de hispana Gvineo en du provincojn: Rio Muni kaj la insulon Fernando-Po aperis serio de 10 p.m., ĉiuj kun la sama bildo: Nia Sinjorino de la Sta. Koro. La valoroj estas:

25 ct. griza violblua, 50 ct. olivkolora, 75 ct. brune violblua, 1 pa. oranĝkolora, 1.50pa. verda, 2pa. siringviola, 3pa. blua, 5pa. brunruĝa, 10 pa. flava.

**RIO MUNI:** eldonis ankaŭ serion de 10 p.m. (samvaloraj kiel la p.m. de Fernando-Po). Bildo: baptoto de la propra lando; sur la fono misiisto.

**FRANCUJO:** Por honori la heroojn de la kontraŭstaro aperis serio de 5 p.m., el kiuj ni mencias:

0.50 fr. brunruĝa kaj verda: portreto de abato René Bonpain; naskiĝis en 1908, pafmortigita 30-3-1943.

**LUKSEMBURGO:** 5 gr. ardezoblua kaj hele violblua. Bildo: Jesuo, Maria kaj Jozefo rifuĝas al Egiptujo.

**GERMANUJO:** Pro la pasionaj misterludoj en Oberammergau estis eldonata p.m. 10 pf. verda/flava/griza. La marko prezentas barokan bildon de t.n. „Malsattuko”. En la mezepoko estiĝis la kutimo por en la Fasto pendigi antaŭ la altaro blankan kurtenon sur kiu estis broditaj la diversaj torturiloj. Nur dum la Sta. Meso je dimanĉoj la kurteno estis forŝovata. Poste pli kaj pli la malsattuko malaperis.

**NIKARAGVO:** p.m. 5 c. blua: Kristo protektas la malriĉulojn.

*PERUO*: Por instigi la partoprenon en la VI-a Nacia Eŭkaristia Kongreso (25-28 aŭgusto 1960) aperis simpla p.m. (10 c.) en tri koloroj: ruĝa, blua kaj verda.

J. S. Jansen.

*KOREKTO*: Ni rimarkigas, ke la serio de memorigaj poŝtmarkoj pri la centjara datreveno de la apero de la unua Sicilia p.m. estas eldonita de la Respubliko de *San Marino*, ne de Italujo. (Sur. p. 176 ĉe *Italujo*.) — *D-ro J.F.B., Ragusa, Sicilio.*

## *Respondoj al Demandoj*

*Demando*: Oni povas legi sur la paĝo 181 de „*Espero Katolika*” de oktobro 1960 la malfeliĉan aserton (de sendube distrita scienculo), ke la Evangelioj kaj la Eklezia Tradicio *supozas* ke la Dipatrino restis virga ankaŭ post la naskiĝo de Jesuo. La vero estas, ke tio ĉi ne estas *supozo*, sed *neeraripova dogmo* de la Eklezio, kiu solene deklaris, ke la Virgulino Maria ĉiam konservadis la virgecon.

*P. Joachim SS.CC. Nuland, Nederlando.*

*Respondo*: La Eklezia doktrino certe la ĉiaman virgecon de Maria kiel dogmon instruas! La komento ĉe Mt 1,25 nur indikas, ke tiu teksto mem nenion enhavas pri la postnaskiĝa periodo, sed ankaŭ ne ekskludas. Pro tio, ke la doktrino el aliaj fontoj estas pli kompleta, tiuj fontoj supozas, ke Mt 1,25 posedas la saman signifon. La supozo de tiuj fontoj do ne rilatas la virgecon de Maria, sed la signifon de Mt 1,25. Ni aldonu, ke „supozi” signifas nederlande: „veronderstellen”, france: „supposer”. Evitinda estas la traduko nederlande: „vermoeden”, france: „soupçonner”, kio estas tradukenda per: „suspekti”. La vortaro de A.G.J. van Straaten en ĉi tiu punkto estas erariga.

\* \* \*

*Demando*: Kial ni diras: „Laŭdata estu Jesu Kristo. En eternon? Mi ne vidas iun direkton, aŭ transiron de unu situacio en alian.

*Br. Arsenius, Alkmaar, Nederlando.*

*Respondo*: „En eternon estas traduko de la latina: „In aeternum”. Kiel la latina teksto akcentas, ke ni ne jam estas en tiu eterna vivo, kiu estos kiel „ĉiama nuno”, tiel ankaŭ la esperanta teksto indikas, ke nia laŭdo nun jam estu, kaj krome daŭru ĝis en eterno, t.e. en eternon. Kvankam la eterno estas ĉiama nuno, ni dum nia surtera vivo kreskas al tiu eterno kaj tiel konstatas iun movon tien.

*H. G. Wannemakers S.J.*

## *Kristnaska problemo.*

Interŝanĝu la literojn de la sekvantaj vortoj: ekz. manio-animo. Je bona solvo la komencaj literoj formas bondeziron al ĉiuj gelegantoj de *Espero Katolika*.

mordi — terni — klubo — merito — turni — tenadi — karoto — karno — greno — parko — kranio — divano — nukso — altaro — baleno — radio — listo — porko — oferi — dueto — besto — konti — sorto — ĝeni

*Li de Jong-Roobeek.*





*RADIO VARSOVIO* elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

*RADIO ROMA* Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).  
La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).  
Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,  
Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;  
merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

## DECEMBRO 1960

2: Tra Romo: Kastelo Sankta Anĝelo; 6: Novaĵoj el Italujo; 7: Kuriero de Esperanto; 9: Leterkesto kaj Bibliografio; 13: Tra la literaturo; 14: Kuriero de Esperanto; 16: Italaj belartaj urboj: Lecce; 20: La Sanktulino de la stevardinoj: S. Bona el Pisa; 21: Kuriero de Esperanto; 23: „Kristnasko“, sankta himno de Aleksandro Manzoni; 27: Italaj kanzonoj en Esperanto; 28: Kuriero de Esperanto; 30: Alia jaro pasis.

## JARLIBRO 1960

*Listo de la Sacerdotoj:*

*Brazilo:* David de Alcantara Miranda, C.P.84, Governador Valadares, Minas-Gerais.

*Hispanujo:* José Pericot, vikario, Parroquia de la Piedad, Vich (Barcelona)  
Jesús Mendo Sanchez, Coadjutor de Santiago, Miajadas (Cáceres)

*Dumvivaj membroj:*

14. S-ino J. Vincent, Les Andelys, Francujo.
15. S-ro Inĝ. Auguste Broise, Brezolles, Francujo.
16. S-ro R. Olivaux, Nantes, Francujo.
17. F-ino Annemarie Orterer, Rottach-Egern, Germanujo.

La novajn konsulojn de IKUE ni mencias en la jarlibro 1961.

## DEKLARO PRI „NEPALO“

En la libro *Nepalo malfermas la pordon*, de Tibor Sekelj, eldonita de STAFETO, aperis postparolo kaj geografia mapo, en kiuj kelkaj landnomoj kaj aliaj geografiaj nomoj ne koincidas kun tiuj donitaj en la teksto de la libro. — Tia nekonskvenco okazis, ĉar la eldonisto kaj la prizorganto de la preso de la libro — pro teknikaj kialoj — ne submetis al la kontrolo de la aŭtoro la postparolon kaj la mapon, en kiuj ili allasis siajn personajn opiniojn.

Pere de tiu ĉi publika deklaro la eldonisto petas senkulpigon kaj esperas, en iu venonta eldono, konsekvence ĝustigi la tuton.

*J. Régulo, eldonisto.*

## INDEKSO POR 1959.

Ambasadoro por 40.000.000 infanoj	31, 50	Lutero antaŭ la katolika Ekumenismo	
Anekdotoj	18, 33, 116, 154, 179, 216	Madono de Varsovio	
Anekdotoj pri Munkeno	148	Madono je la altaro de Veit Stoss	
Antverpeno, la diamanturbo	210	Malkovro de Memortabulo en la Zamenhofstrato, Varsovio	
Arbarhomoj de Sud-Afriko	28, 52, 66	Malsano de Aferistoj	
Arĝenta jubileo de I.K.I.	99, 173	Medito en spaco de kvieto	
Benediktana Abatejo Göttweig	22	Mielert, morto de prof. Max. Maria	
Bibliografio de katolikaj preĝaroj	114, 192	Miraklo pri la sankta Sanĝo en Boxmeer	
Ĉu vi estas ne mia frato?	105	Modela kunagado	
Denove venis la aŭtuno	190	Mondkonataj orgenoj de Oliva en Polujo	
Domo por mildigi la suferadon	144	Mozaikarto	
Enigmoj	155, 179, 199, 220	Munkeno, la urbo de nia kvara Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno	152,
Esperanto-bacilo atakis la urbon Hago	82	Nekonataj leteroj de Zamenhof	
Esperanto en la sanktejo de Ĉenstohovo	170	Nia sinjorino de la Kino	
Esperantologio reaperos	89	Nova fenestro	
Esperanto vivas	12, 34, 54, 77, 94, 117, 147, 176, 183, 214	Novjarsaluto de la Prezidanto	
„Far” kiel prepozicio	194	Nur fava hundaĉo	
„Far”, parolas la leganto	74	Oriento-Okcidento kaj la venonta ĝenerala koncilio	
„Far”, pri la uzo de la vorto,	113	Patro Pire	168,
Farto de nia Birdo	43	Pax Christi marŝoj kaj Esperanto	
Filatelio	20, 118	Perloj de la pola pejzaĝo	
Fin-soleno de la Lourdes-jaro	104	Pia rememoro	
Grandskala Esperanto Kurso	53	<i>Poemoj</i>	
Heroldo de socialreformo	217	Al luno kaj pluen	
<i>I.K.I.</i>		Al Vi Sinjoro	
Arĝenta jubileo de...	99, 173	Kanto de Kompato	
Kiel ekestis I.K.I.	26	Kristnaska kanto	
Raporto pri I.K.I.	69	Legendo pri Laika Frato	
Internacia centro Pio XII por pli bona mondo	42	Majo en Parko	
Jesuo, Kristo pentrita de Satano	45	Nokto de Kompato	
Katedrala festsemajno en Salzburg	103	Patrineco	
Katedralo de Brazilja	191	Petrola lampo	
Kiel ekestis I.K.I.	26	Poemo 1959	
Kiu estas Kiu en la Esperanto movado	87	Por adiaŭo	
<i>Kongresoj</i>		Saĝero	
Kvara mondkunveno de katolikaj Esperantistoj en la kadro de la XXXVII-a Eŭkaristia Mondkongreso, Munkeno	47, 62, 84, 149, 167, 184, 202	Sub veturilo premita infano	
Kvardekkvara Universala Kongreso de Esperanto	6,23,55,83,106,143,150,162	Pola jaro	
Kvardekkvina Universala Kongreso de Esperanto	203	Pola Katolika Unuiĝo Esperantista	1929-1959
Kongreso de U.E.F. en Tours	186	Polaj Maria-kantoj en Esperanto	
Kongreso Itala de Esperanto	187	Poloj-eksterlandanaj kaj PKUE	
Kristnasko en Nov-Gvineo	208	Prediko okaze de la 50-jara ekzisto de Nederlanda Katoliko	
Kvindekjara datreveno de la morto de pastro Emile Peltier	64	Prediko okaze de la zamenhofa tago en Utrecht	
		Prediko de patro J. B. Kao, OFM	
		Preĝejoj de Varsovio	